7-a JARO, N-o 361



LEIPZIG, 3. / 9. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ


APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

Georgo Bernardo Ŝa (Shaw) pri Rusio.

Reveninte de sia vizito al U.S.S.R., Georgo Bernardo Ŝa ĉeestis la t.n. Somer-Lernejon aranĝitan de la Sendependa Labor-Partio (ILP.) k raportis jene per parolado pri siaj spertoj. La traduko estas farita laŭ la raporto en „La Nova Gvidanto" (The New Leader)[1]*, oficiala semajna organo de la I.L.P., de 7. 8. 31. – La tradukinto.*

Kiam mi faris mian kutiman promeson plenigi unu el viaj matenoj tie ĉi, mi ne sciis, pri kio mi parolus. Poste prezentiĝis okazo sekve de mia vizito al Rusio. Nu, ĉiu, kiu iel povas, devus iri al Rusio. Tio ne signifas, ke tre granda proporcio povos iri, ĉar tio ne estas speciale malkara entrepreno. Sed mi predikadis socialismon dum tuta mia politika vivo, *k jen finfine estas lando, kiu starigis la socialismon, faris ĝin la bazo de sia politika sistemo, definitive forigis privatan propraĵon k turnis sian dorson al la kapitalismo.* Lando, kiu sukcese gvidadis la industrion, k atingis politikan konstitucion. Estas do preskaŭ devo por homoj en kapitalismaj landoj, kiuj predikadis la socialismon kvazaŭ en la dezerto, transiri k eltrovi precize kiel la afero efektiviĝas k kiel ĝi okazis. Ĝi estas plena je surprizoj, k kiam mi donos al vi neprilaboritan k babiladecan priskribon pri tio, kia ĝi estas, mi tion faros kun la plena konscio, ke, se la Sovetiaj gvidantoj tie ĉi ĉeestus, ili rigardus min kiel unu el la plej monstraj paradoksuloj, por ne diri mensoguloj, kiuj iam ekzistis.

Ekzemple, la unua afero, kiun mi konstatis kun granda kontentiĝo, estas, ke la Socialismo, kiu sin establis, estas Fabiana[2] Socialismo. *(Ridado.)* Vidu, vi ridas, sed mi estas tute serioza. Plie, Stalin k Trotski ridus, ĉar ili konsideras Fabianon kiel sendanĝeran homon, kiu ne estas revoluciulo. La Fabianoj montriĝis tute pravaj, k la sistemo, kiu sin establis, estas Fabiana sistemo. Parenteze, mi ne diris tion al ili. Tio estas unu el la aferoj, kiujn mi rimarkis. La alia afero, kiun mi ja tute libere diris, por la profunda k granda amuziĝo de Stalin, estas, ke ĝi estas sendube religieca sistemo. Rusio estas religia lando. Ili ne povis prezenti al si, ke ni estis seriozaj, kiam ni diris, ke la Tria Internacio



Georgo Bernardo Ŝa (Shaw)

estas Eklezio, klare k neerareble, sed tio estas absolute vera. Sed mi diras, ke ĝi estas Fabiana Socialismo, k ĝia inspiro estas trapenetrite religieca. Kaj tie ĉi mi atenteme parolas la precizan veron.

Estas tiom multo dirinda, ke mi nur povas preni pecetojn k fragmentojn por ilustri. Estas miriga la rapido, laŭ kiu la aferoj ŝanĝiĝis. La fakto, ke ili faras sukceson el ĝi, ne estas tiel honorinda al ili kompare kun ni, kiel eble ŝajnus. Mi ne volas envii al ili laŭdon, sed vi devas memori, ke ili laboradas sub kondiĉoj, kiuj estas preskaŭ idealaj. Ili laborigas la maŝinojn kun oleo en iliaj frotpartoj, dum ni laborigas niajn maŝinojn kun sablo ĉe la frotpartoj, k la frotado estas grandega. Tiu frotado ne ekzistas en Rusio. Tie ĉi vi havas privatajn posedantojn k proletaron, kiu vivtenas sin vendante sian laborpovon. La principo de la tuta afero tie ĉi estas, ke la rolo de la kapitalisto estas havigi al si tiom, kiom li povas, el la proletaro, k doni al la popolo tiom malmulte kiom eble kompense, k la principo de la proletaro estas havigi al si tiom, kiom eble, k doni tiom malmulte kiom eble.

Mi memoras, ke mi trapasis grandan elektran fabrikon en Moskvo. Mi tenadis la okulojn vigle malfermitaj al la aferoj, kiujn mi volis vidi, aferoj, kiujn ili neniam ekpensis montri al mi. (Mi povas tuj diri, ke ĉio, kion oni diras pri tio, ke vi nur vidos tion, kion ili volas montri al vi, estas ĝuste sensencaĵo). Mi ne volas iri al Rusio por vidi tion, kio restas da malriĉo k malscio el la kapitalisma sistemo. Mi povas vidi tion dudek minutojn de mia propra pordo en Londono. Mi volas vidi la plej bonan, kiu estas farebla. Dum mi estis en tiu ĉi fabriko, juna viro, kun mieno de konscia virto, prezentiĝis al mi. Li havis iaspecan ordenon kroĉitan al sia jako, k li estis la juna viro, kiu faris la takton en tiu fabriko rilate al la efektivigo de la Kvinjara Plano. Li faris pli ol iu ajn alia, k mi diris al li: „Juna viro, se vi estus en Anglio, k vi starigis duoble pli rapidan laboron ol viaj kunlaborantoj, vi ne estus populara homo, k vi riskus, ke briko estus faligata sur vian kapon en malluma vojeto. Se vi intencas daŭrigi laŭ tiu ĉi maniero, amiko mia, vi

[1] La substrekoj estas laŭ la raporto en „La Nova Gvidanto".

[2] *Fabiano* = ano de la Fabiana Societo, fondita en 1884. Ĝi estas societo el socialistoj, kiuj volas propagandi siajn doktrinojn per morala persvado. Ĝi neniam estis multanara, sed ĝi havis profundan influon al la socialista pensado en Anglio. Inter la plej famaj membroj estis Ŭeb (Webb), Podmor (Podmore), Oliver k Ŝa mem.

restadu en Rusio". Certe tie la junulo estis populara. Li kondukis al kompetento.

S-ro Ŝa daŭrigis por rememorigi al siaj aŭskultantoj, ke malgraŭ ĉiuj malbonaj tempoj, tra kiuj ni nun pasas, la posedanta klaso nuntempe en tiu ĉi lando ricevas pli ol iam ajn antaŭe

Konsiderante la Kvinjaran Planon entute, estas evidente, ke *ni bezonas tre urĝe Kvinjaran Planon tie ĉi. Oni tre urĝe bezonas Kvinjaran Planon en Usono.*

Kial oni ne povas ĝin havi? Oni havas ĝin tute facile en Rusio. „Streĉu viajn fortojn", ili diras tie. „Malsatigu vin iomete, ne atendu iajn luksaĵojn, laboru kiom eble plej forte dum la proksimaj kvin jaroj". Sed proponu tion al la laboristoj tie ĉi, diru al ili: „Faru bonegan klopodadon dum la proksimaj kvin jaroj". Ili dirus: „Fari oferojn, por ke la senokupa k riĉa klaso fariĝu eĉ pli maldiligentema k riĉa ol antaŭe? Mia tasko, kiel laboristo, estas akiri kiom eble plej grandan salajron, sed redoni kiom eble plej malmulte por ĝi". En Rusio, estas simple. Ili scias en Rusio, ke tion, kio venos el la Kvinjara Plano, ili ricevos.

Estas aferoj en Rusio, kiuj eble mirigos kelkajn el vi. Ili eble aspektos iom tro Fabianecaj al vi. En Rusio vi pagas luprezon por la loĝejo. La rusoj ne estas popolo, kiu ŝategas privaton, k se vi volas kompreni, kiel la rusoj vivas, vi devas kompreni tion. Ŝajne ili neniam vivas malpli ol kvinope en unu ĉambro k havas nenian specialan kontraŭemon je dek personoj en unu ĉambro kondiĉe, ke estas sufiĉaj litoj. Tio ĉi eble ŝajnos iom nekomforta al kelkaj el ni. Mem mi ne povas dormi, se estas aliaj homoj en la ĉambro, sed ili ne povas dormi, krom se estas aliaj homoj en la ĉambro.

Mi iris al la Rusia Ŝtata Banko en Moskvo. Mi volis vidi la imperiestran juvelaron k mi volis monerigi kreditleteron; do mi unue demandis pri la kreditletero. Ho! ne necesas vin ĝeni pri iaj kreditleteroj, via ĉeko taŭgos ĝis iu ajn sumo! Tiam mi demandis pri procentaĵo. Certe, 8 procentoj. Do mi pensis, mi deponos tutan mian monon tie ĉi, kio, ili sugestis, estus tute bona, sed ili ne permesus al mi kunpreni ĝin el la lando. Tamen, mi pensas, ke kelkaj el vi eble havas viziojn pri lando, en kiu la mono ne produktas procentaĵon. En Rusio la mono alportas procentaĵon k tiu procentaĵo varias, same kiel en aliaj landoj.

Rilate al rentumo, la diferenco tie ĉi estas, ke vi pagas ĝin al la homo, kiu, tiom kiom vi scias, eble iros k forelspezos ĝin en Monte Karlo. Sed en Rusio ĝi estas pagata al loka Soveto k utiligata por publikaj celoj, el kiuj vi ricevas la profiton. Tamen vi devas pagi pro via loĝado.

Se ĉiuj luprezoj de Londono estus pagataj al la Londona Urbega Konsilantaro, ne estus urbimpostoj, k ne nur estus tio ĉi tre agrabla, sed estus multo elspezebla por amuzoj k agrablaĵoj. Sed en Londono tio ĉi estas bolŝevismo, socialismo, komunismo, ĉio timiga k terura. Alivorte, homoj en Londono estas stultuloj k la homoj de Moskvo estas saĝaj. Tio memorigas min pri sufiĉe interesa punkto.

Estas ege malfacile al rusoj kredi, ke ni efektive estas tiel stultaj, kiel ni fakte estas. Tre multaj el la aferoj, kiujn ni faras, ŝajnas al ili esti intencataj. Stalin mem diris: „Sed nepre iu inteligenta homo povas kompreni . . . tion k tion ĉi". Sed mi diris, ke nia popolo ne estas inteligenta. Tio estas ĝuste la unua afero, kiun vi devas renversi. Kaj mi povis konstati, ke Stalin estis nekredema pri tio, ke homoj povus esti tiel stultaj kiel ne konstati la avantaĝojn en la komunisma sistemo. Vi devas memori tion ĉi. Angla ŝtatisto kredas esti morale k spirite supera k supera je klero komparc kun la rusa ŝtatisto. Li estas komplete trompita rilate tion. Morale, li estas fakte abisme malsupera. Kio koncernas la spiriton, kiun li akiris ĉe Itn (Eton) k Oksford[3] . . . nu vi konas la specaĵon. En Rusio ili ne nur estas en la grandege pli supera pozicio de la komunismo, sed ili estas intelekte pli superaj. Ili komencas per legado de K. Marks, k la danĝero en tio estas, ke ĝi produktas intelektan superecsenton. Kiam vi legis Marks, vi scias tiom pli ol antaŭe, ke ĝi igas vin kredi, ke vi scias ĉion, k vi tre emas malestimi la homon, kun kiu vi traktas.

Mi diris al Litvinov: „Ĉu vi memoras viajn rilatojn kun la mortinta lordo Kurzon?" (Lordo Kurzon diris: „Mi ne povas interrilati kun tiu ĉi persono; li estas simpla persono. Mi ne povas diskuti politikon kun persono de tia rango! vi same povus atendi, ke mi pridiskutu la registaron de mia lando kun mia lakeo"). Tiu ĉi socia (mondcuma) superecaĉo estis efektive tre ruiniga en la tempo. Kiam homoj plendas pri la superecaĉo de Kurzon, la superecco, per kiu li malestimis Litvinov, estas kiel nenio, kompare kun la intelekta supereco, per kiu Litvinov rigardis Kurzon. Ili rigardis nin kiel sensaĝulojn, k ni ne povas konscii, ke ni estas sensaĝuloj.

(Daŭrigota.) *Trad. 2978.*

Kiu(j) atingis per malica, mensoga denunco, ke „S-ulo" k a. SAT-eldonaĵoj ne plu povas libere eniri Sovetion, tiu(j) estas plej certaj maskitaj kontraŭrevoluciuloj.
La veraj amikoj de Sovetio estu elpensemaj, ili trovu rimedojn por informi niajn tieajn K-dojn. Havigu al viaj korespondantoj la plej necesajn dokumentojn por ke ili povu ĝuste prijuĝi la situacion en la tutmonda lab. esp. movado. Petu al ni materialon.

[3] Studejoj por burĝoj en Anglio. — *Red.*

ARTEFARITAJ FLOROJ

Loĝante en malgranda saksa urbo proksime de la ĉeĥa landlimo, mi jam depost mia infaneco konatiĝis kun la ĉi tiea industrio de artefaritaj floroj. Belegajn florojn oni ĉi tie produktas, tiel ke oni devas pensi, ke artistoj estas iliaj farintoj. Efektive, la gelaboristoj en ĉi tiu industrio estas veraj artistoj. Pripensante, ke la floroj estas farataj plejparte el ŝtofo, silko, veluro, papero, tolo ktp., oni rigardas ilin miregante, ke homoj estas kapablaj produkti el tiaj simplaj aĵoj preskaŭ vivant-aspektajn kreitaĵojn, kiaj estas la artefaritaj floroj.

Jen la produkta procedo: Laboristo prenas pakaĵon da ŝtofo k helpigante alian laborkamaradon, li tiel metas la ŝtofon, ke el ĝi fariĝas longa ses- aŭ dekduobla peco. Tiam per akraj ŝtalaj formiloj estas elbatataj la dezirataj specoj. Nun tinkturistoj kolorigas diversmaniere per anilintinkturo la elbatitajn formojn. Post sekiĝado en granda forno, la formoj estas premataj denove en formilojn, kiuj enpremas la vejnojn k bezonatajn ondetojn k profundojn, ĉar antaŭe la formoj estis tute plataj. Per ĉi tiu laboro finiĝas la vira kunhelpado. La produktadon nun daŭrigas virinoj. La formojn ili gluas k volvas sur draton, ĝis fine la artefarita floro ekestas. Tiam oni ligas la florojn tiel, ke ili formas bukedojn, brančojn aŭ girlandojn, kiuj ornamas la virinajn ĉapelojn, aŭ metite en vazojn ĝojigas la rigardanton. Tio estis, mallonge priskribite, la fabrikado.

Nun ni pritraktu la salajron de tiuj gelaboristoj. Ni povas konstati, ke ĝi estas tre malgranda. Kompare kun tio, kiajn belajn aĵojn la gelaboristoj kreas, k kiom la entreprenistoj postulas de la aĉetantaj klientoj, oni povas rimarki, ke la gelaboristoj estas ege ekspluatataj. Ankaŭ en ĉi tiu industrio estas okupataj multaj tielnomataj hejmlaboristinoj. La salajro, kiun tiaj virinoj ricevas por sia laboro, estas terure malalta. Por tute nesufiĉa salajro oni eĉ laborigas infanojn, k tiel okazas, ke se oni rigardas en tiajn loĝejojn, oni trovas la tutan familion okupata per produktado de floroj.

Ankoraŭ estas menciinde, ke la artefaritaj floroj tute estas dependaj de la ŝanĝiĝema karaktero de la modo. Preskaŭ la duonan tempon en la jaro la plejmulto el la viraj laboristoj estas senlabora. Ĉiam por la entreprenistoj ekzistas sufiĉe granda rezervarmeo da faklaboristoj, k sekve de tio, la mastroj havas bonegan rimedon por subpremi la laborantajn virojn.

La virinojn oni tiel traktas, ke se ili ne emas produkti por tiom malgranda salajro, oni diras: Tiam la varoj

LA FONTO DE SENLABORECO (3. daŭrigo. Vd. n-ojn 357-360.)

7.

Jam la ekzemplo de Meksikio esperigas nin, ke tie iam estos forigata la granda propraĵo de tero, do, la baro por la homoj akiri sian plej ĉefan produktilon. Tiam ni ankaŭ povos ekzameni, ĉu, sub tiaj kondiĉoj, la rezerv-armeo malaperos. Sed ni eĉ ne devas atendi ĝis tiam. Ekzistas jam nun ekzemploj, kiuj montras al ni iagrade, ke nia aserto estas ĝusta.

Belan ekzemplon montras al ni la „lando de festa laboro", **Bali,** malgranda insulo proksima de Javo. Pri tiu raportas la mond-vojaĝisto *Kolin Ros:* „... La tero estas la propraĵo de l'dioj. Ili lasas ĝin al homoj por uzado, k ili volas, ke ĉiuj partoprenu je tio egale. Sur tiu kredo baziĝas la agrara komunismo Balia. La *Desa*, la vilaĝa komunumo, disponas pri la tero. (Ankaŭ en Meksikio, la kampula mastrumado baziĝas ankoraŭ sur la malnovega vilaĝa komunumo, sur la *Ejido. W.*) Ĝi donas al ĉiuj parton da tero, kiun li prilaboru k kies fruktojn li povas rikolti; sed posedi la teron kiel propraĵon ne estas eble. ... Kiam la vilaĝa loĝantaro kreskis tiom, ke la tero de la komunumo ne sufiĉas por nutri ĉiujn, tiam la junuloj elmigras k fondas novan vilaĝon en la praarbaro.

„... Tiu laboro ja ne estas tiaspeca laboro, kian ni konas, sed gaja ludo, festo k nura nova formo por unuiĝado kun naturo k dio.

„Ankoraŭ pli multe ol ĉe plugado k semado k plantado tio estas komprenehle videbla ĉe la rikoltado. Rikolto de l'rizo estas granda festo. Preskaŭ mi estus dirinta: la plej granda festo, se ne ĉio sur tiu insulo estus festo, k se oni ne travivus daŭran pliigadon dum tiuj festoj.

...

„Do, estas vere granda laboro, ĝis estas rikoltitaj la fruktoj. Sed, kiel okazas tio! Muziko k flagoj akompanas la marŝon eksteren. Akompanate de la sonoj de l'tamtamo k de la man-tamburoj oni laboras. ... Mi staris longe sur la kampo, tre longe. Senĉese mi vidis interne la lacajn ĉagrenitajn vizaĝojn de l'viroj k virinoj en niaj fabrikoj. Ho, tiom malproksime rememori eĉ ne necesis! Necesis nur memori pri la javaj suker-fabrikoj. Mi forgesas ja neniam, ke ni dankas al la moderna tekniko multe da komforto, multe da agrablaĵoj, multe da certo por la vivo. Kaj mi opinias, ke aŭtomobiloj, aviadiloj, fervojoj k radio estas aĵoj, kiuj meritas rekompencon. Tamen, tiu rekompenco pagata de ni por tekniko k civilizo ŝajnas tre alta, se mi vidas ĉi tie, ke laboro povas esti festo k ĝojo, sed ne peno kiel ĉe ni."

LITERATURO:

germanlingva:

Kolin Ros: „Hodiaŭ en Hindiô." Lajpcigo 1930.

Sed ankaŭ en Eŭropo ni havas „feliĉan insulon". Tiel estas nomita **Francio** en la ekonomia parto de granda gazeto, ĉar la nuna tutmonda krizo efikas en Francio relative malmulte.

Kial Francio sentas tiajn efikojn relative malmulte? La respondon donas artikolo de *Leo Ĵuhu* (Jouhoux), de l' ĉefa sekretario de la C.G.T. (Ĝenerala Laborista Konfederacio): „Rigardante la situacion de l'laborista okupado en Francio, oni ekkonas eksterordinaran staton. ... Eksterordinara stato, kiun karakterizas *treege malgranda senlaboreco.* La nombro da subtenataj senlaboruloj estas sensignifa rilate al la nombro da laboristoj. Krome, oni devas konsideri la ekziston de rimarkinda nombro da *fremdaj laboristoj* (proksimume 2 milionoj)."

Francio mem ne havas rezerv-armeon laboristan. Mi memoras pri jara raporto de firmo el *Belfor* (bedaŭrinde mi forgesis la nomon), kiu menciis, ke ĝi akcelis la meĥanikigadon de l'laboro pro manko de laboristoj. Tamen la situacio de l'francaj laboristoj ne estas pli bona ol en aliaj landoj. Ĉar la francaj kapitalistoj disponas pri la rezerv-armeoj en Ĉeĥoslovakio, Polio, Italio, Belgio, Germanio ktp. Francio mem ne havas rezerv-armeon.

Kial ne? Unue, la pliiĝo de l'loĝantaro estas malgranda rilate al la evoluo de l'industrio, Sed pli grava estas jena kaŭzo: „La favora ekvilibro inter terkultura k industria produktado donas al la franca ekonomio grandan rezist-kapablon. Preskaŭ duono de l' franca loĝantaro ekzistas per terkulturo; en ĉi tiu la malgrandaj entreprenoj estas pli multaj, entreprenoj, kies posedantoj laboras por la propra konsumo." Tiel la „Frankfurta Gazeto" raportas pri la „feliĉa insulo". Kaj *Andre Kurten* (Courtin), vicprezidanto de l'Asocio por terkulturo en Francio, raportas: „Esence, Francio estas lando de malgranda ter-propraĵo k de malgrandaj bienoj. Ĝi estas la lando, pri kiu oni plej prave povas diri: la tero estas la propraĵo de tiu, kiu prilaboras ĝin. ..."

La entreprenoj ĝis 40 hektaroj posedas 62 elcentojn de l'tuta tero. La pli grandaj bienoj ofte posedas pli malbonan teron. En kelkaj distriktoj la grandaj entreprenoj estas farm-bienoj, kies tero — kontraŭa al niaj supraj ekzemploj — estas propraĵo de diversaj malgrandaj posedantoj. Ci tiu formo de l'terpropraĵo superregas, „ĉar la grandega terpropraĵo estis dispartigita grandparte jam dum la revolucio de 1789." *Kurten* finas: „Dank' al terkulturo la senlaboreco en Francio estas ĝis nun relative malgranda."

LITERATURO:

esperanta:

„ISK" n-o 8, oktobro 1930.

germanlingva:

„Frankfurta Gazeto" n-o 713, 24. 9. 1930.

„Francio, ekonomiaj kajeroj de l',Frankfurta Gazeto'."

„ISK" n-o 6, junio 1930.

franclingva:

„Statistika jarlibro" 1928.

„Oficiala ĵurnalo" n-o 103, 6. 12. 1929.

„La socialista vivo", 16. 11. 1929.

8.

Ni konstatis, ke ne nur per la nuna ekonomia krizo estas kreita armeo el senlaboruloj, sed, ke tiu armeo el senlaboruloj, la rezerv-armeo, estas konstanta fakto de l'kapitalismo, ke la industria kapitalismo estas bazita sur ĝi. Bildeto montris al ni, ke la rezerv-armeo venas de l'kamparo. Pro tio ni demandis:

Ĉu la rezerv-armeo venas de l'kamparo?

Se ĝi venas de l'kamparo, devas troviĝi ĝia kaŭzo ankaŭ sur la kamparo. Pro tio ni plue demandis:

Kio estas la kaŭzo de l'rezerv-armeo?

Niaj ekzemploj montras: La rezerv-armeo migras, serĉante laboron, el la distriktoj de l'granda ter-propraĵo en la urbojn. Do, laŭ la kaŭzo, ĝi ne estas industria, sed kampara rezerv-armeo.

---

estos produktataj ĉe la hejmlaboristinoj! Ankaŭ diversspece estas pagataj ĉi tiu lasta kategorio da laboristinoj. La hejmlaboristinoj en mia urbo k ĝia proksimo ricevas pli da salajro, ol tiuj, loĝantaj pli malproksime de tiu ĉi urbo. Per ŝarĝaŭtomobiloj oni transportas la duonfabrikitan varon ofte en kelkajn horojn malproksimajn vilaĝojn. La salajro, kiu tie estas pagata, estas terurege malalta. Por akiri *unu* markon germanan, tie la tuta familio devas laboregi *pli ol unu tagon.*

Supozante, ke preskaŭ ĉiuj homoj ŝatas la artefaritajn florojn, mi skribis ĉi tiujn liniojn, por ke ili ankaŭ sciu, kiel estas traktataj tiuj, kiuj produktis ilin. *SAT-ano 16432.*

ELSUDO 2-a eldono
ABC de Sennaciismo
Provo prezenti la evoluon de internaciismo al sennaciismo per cito de socialistaj aŭtoroj k trakto de l' nacia problemo en Sovetio. Originalo, 60 paĝoj. Formato: 11×18 cm. Prezo 0,50 mk. g.
Administracio de SAT, Leipzig O 27

En *Germanio*, ĝi migras el la orientaj distriktoj de l'grandaj bienoj en la okcidentajn industri-distriktojn k urbegojn. La samajn cirkonstancojn ni povas konstati en Polio, Ĉeĥoslovakio, Hungario. En *Britio*, la afero ne estas alia; ankaŭ tie ankoraŭ pli tipa baro de l'tero per granda propraĵo forpelas la homojn en la urbojn k al elmigrado. Sed hodiaŭ, la elmigrado ne estas ebla por nehavantoj. Tion montras al ni la ekzemplo de Afriko, kie la tero estas ankaŭ okupita grandamplekse de kelkiuj, kie la indiĝenoj estas devigataj perforte al laboro por la profitoj de tiuj malmultaj homoj. Ankaŭ la „senlimigita vasto" de l'kolonioj estas nun nur bela frazo.

Afriko, montras al ni ne tiom la efikojn de l'granda terpropraĵo ol la manieron, kiel estas kreata k kreita ĉi tiu. Tiom pli klara montras al ni la kolonia *Hindio* k *Ĉinio* premita de la influo de l'imperiistaj ŝtatoj, ke la rezerv-armeo estas kampara rezerv-armeo. La industrio en ambaŭ landoj estas ankoraŭ juna k okupas nur parteton de l'loĝantaro. Malgraŭ tio ambaŭ landoj havas grandegajn armeojn el senlaboruloj, kiuj kaŭzas, ke la salajroj estas premataj ĝis sub la malaltega nivelo necesa por vivi. Kaj la citaĵoj de iamaj ĉinaj saĝuloj montras, ke ĉi tiuj armeoj el senlaboruloj ekzistas jam dum jarmiloj. Kiel per la ekzemploj de Hindio ni ekkonas ankaŭ ĉi tie, ke la ter-monopolo, la fakto, ke malmultaj homoj posedas la tutan teron, estas la kaŭzo de l'rezerv-armeo. Ĉar ĉi tie kiel en la industriaj landoj la ter-monopolo forbaras la homojn de ilia plej grava k unua produktilo. Ĝi devigas la homojn vendi sian laborforton al la posedantoj de l'monopolo por malalta salajro. Nur sur tiu monopolo baziĝas la monopolo de l'posedantoj de senlimigite produkteblaj produktiloj. *Marks* citas kiel ekzemplon por tio la raporton pri s-ro *Pil* (Peel): En jaro 1833, ĉi tiu elmigris kun sia tuta entrepreno k 3000 homoj el Britio al Aŭstralio por prilabori la krudmaterialojn ĉe la loko de ilia produktiĝo. Sed, kiam li alvenis tien, li restis eĉ „sen servisto, por pretigi lian liton". La laboristoj prenis por si tiom da tero, kiom ili bezonis, k s-ro *Pil* sidis ĉe siaj maŝinoj sen laboristoj. „Malfeliĉa s-ro *Pil*, kiu prizorgis ĉion, escepte la eksporton de l'britaj kondiĉoj por produktado al la *Svan-River!*" *(Marks.)*

La samon li travivus ankoraŭ nun sur la insulo *Bali;* ĉar tie ankoraŭ ne ekzistas ter-monopolo k pro tio ankaŭ ne kapitalistaj kondiĉoj de l'produktado. Tie ni vidas, kiel justa ekonomia ordo: „La tero apartenu al tiu, kiu kulturas ĝin" garantias feliĉan ekonomian staton. Bali ne konas senlaborecon k ĝia ekonomia ordo ebligas por ĝiaj loĝantoj kontentigan viv-tenon, kvankam sur malalta nivelo de l'produktado. *Kolin Ros* opinias, ke la maljustoj de nia socia ordo estus la prezo, kiun ni devus pagi por tekniko k civilizo; sed certe li eraras pri tio, ke ni *devas* pagi. Jam la ekzemplo de *Francio* montras, ke simila ekonomia ordo kaŭzas favorajn cirkonstancojn de l' tuta ekonomio. Ĉe tiu ekzemplo ni ja ankaŭ ne forgesu, ke Francio ne estas izolita insulo meze inter siaj najbaraj landoj kapitalistaj. Ĝi ja ne havas propran rezerv-armeon, sed ĝia kapitalistaro disponas pri tiu de siaj kapitalistaj najbaroj. Eĉ, se la franca laboristaro sukcesus realigi baron por enmigrantoj kiel en Usono, reala sukceso estus dubema; verŝajne la francaj kapitalistoj tiam translokus sian produktadon mem en najbarajn landojn k tiel ili eluzus plue ties armeojn el senlaboruloj. Ankaŭ tiu favora ekzemplo certigas almenaŭ la ĝuston de niaj konstatoj:

La rezerv-armeo venas de l'kamparo!
Ĝia kaŭzo estas la ter-monopolo!

(Daŭrigota.)

Vetig (16900), Gelnhaŭsen (Germ.).

Eksterordinaraj tagoj el mia vivo.

(Impresoj pri tendara vivo en la Ruĝa Armeo.)


V. V. Kalaŝnikov

Eksterordinarajn tagojn mi havis kelkajn estante ankoraŭ knabo, sed la plej interesaj k konigindaj estas nur tiuj, pri kiuj mi volas al vi ĉi sube rakonti.

Tio estas mia militservo en la vicoj de l'Ruĝa Armeo, kiu tute ŝanĝis ĉiujn miajn ĝis nun havatajn kutimojn k travivaĵojn. Dum alvoko al militservo aŭtune en la jaro 1928, mi estis enregistrita por servo en teritoria regimento, tio signifas, ke mi militservos kun interrompoj, ne forlasante tute mian oficon.

Nuntempe ĉe ni ekzistas du specoj de militservo, nome 1) efektiva militservo, kiam oni alvokas servi en infanterio, kavalerio k artilerio dum 2 jaroj, milita aerŝiparo dum 3 jaroj k en milita marŝiparo dum 4 jaroj. (Certe civitanoj, kiuj havas mezan aŭ superan kleron, havas privilegiojn k militservas dum malpli multaj limtempoj k fariĝas komandantoj de rezervo). Kaj 2) teritoria militservo, kiam militservo nur en infanterio, kavalerio k artilerio daŭras dum 5 jaroj, sed militstudado nur dum 7–8 monatoj. Por militstudado, teritoria aŭ ŝanĝa militservantaro estas alvokata al tielnomataj „kolektiĝoj". Dum la unua jaro la kolektiĝoj daŭras dum 3 monatoj, por nove rekrutitaj ruĝarmeanoj, k dum sekvantaj 4 jaroj tiuj kolektiĝoj estas nomataj ĝeneralaj k daŭras dum 1–2 monatoj. La tutan alian tempon tiuj teritoriaj militservantoj sin okupas hejme, havante forpermeson k laboras, ĉu en fabrikoj, oficejoj, ĉu en siaj vilaĝoj. Tio estas farita, por ne forŝiri de produkta laboro grandan nombron da loĝantaro, por havi malpli da ŝtataj elspezoj por militaj bezonoj, por doni privilegiojn al tiuj, kiuj estas en familioj solaj laborantoj. Dum interrompoj en militservado, ĉiu ruĝarmeano devas aktive partopreni en civita milita volontula organizo „Osoaviaĥim"; ankaŭ ĉar monataj kolektiĝoj okazas dum somero en tendaroj (dum la unua jaro en monatoj majo–aŭgusto, dum pluaj en septembro); dum vintro ankaŭ por refreŝigo de militkonoj k ilia aplikado en vintraj kondiĉoj estas aranĝataj 1–3-tagaj kolektiĝoj en kazernoj de l'respektivaj loĝlokoj.

Sekve, dum sia tiel mallonga limtempo de militservo, ĉiu teritoria ruĝarmeano devas peni tre bone studi la tutan militsciencon. Mi estis ruĝarmeano en artileria divizio de infanteria regimento. La militservo komenciĝis meze de majo d l'jaro 1929. Antaŭe estis militordono, ke ĉiuj devas veni al kolektpunktoj, ĉe ni en urbo, ĉe aliaj en vilaĝoj, por ruĝarmeaniĝi. Antaŭ ĉio, kiam oni venis frumatene en kazernon, oni medicin-esploris la sanon de l'ruĝarmeanoj, poste donis al ni ruĝarmean veston k ni fariĝis ruĝarmeanoj. Poste oni donis aliajn militobjektojn k vicmarŝe ni iris al la stacidomo por veturi per trajno al ĉetendara stacio.

Por mia k ĉies malfeliĉo, ĉi tiu tago estis malhela, sensuna, pluvis, estis malvarme. Ni marŝante el la ŝvitbanejo al la kazerno, sub pluvo, tre malsekiĝis. Poste mi sentis sufiĉan malvarmon, atendante la forveturon de l' trajno de la 18-a horo ĝis la 24-a (antaŭnoktmeze), tial ke estis tre multa laboro por envagonigi ĉiujn materialojn, havaĵojn k homojn. Ni ankaŭ envagonigis niajn kanonojn. Ĝuste je la 24-a horo, je noktomezo, ni forveturis. La plej multaj, krom la deĵoranto, dormis. Frumatene ni jam atingis la ĉetendaran fervojan stacion. (Distanco de la urbo — 60 kilometroj.) Ni veturis en simplaj varoŝarĝaj, tielnomataj ĉe ni „bovidaj" vagonoj. Unuj el ni elvagonigis niajn kanonojn, aliaj tutan sian milithavaĵon. Parto de ruĝarme-

La klasbatalo tra la mondo

Membrostato k buĝeto ĉe la Germania Libera Sindikataro (A.D.G.B.)

La centro de l'tielnomata Libera Sindikataro Germania (ADGB) publikigis statistikon pri la al ĝi aligitaj sindikatoj en la jaro 1930: „La kreskanta senlaboreco sekvigis malpliiĝon de la membronombro. La sumo de l'membraro malaltiĝis je 4,7%, nome ĝis 4 717 565 kontraŭ 4 948 209 en la fino de 1929. La malpliiĝo atingas 16,7% inter la ŝtonlaboristoj; 13,7% ĉe la muzikistoj; 11,2% ĉe la frizistoj; 10,7% en la vestindustrio. La malaltiĝo restas sub 10% por la ceteraj sindikatoj.

„La enspezoj falis de 251 milionoj da germ. markoj ĝis 231 milionoj, dum la elspezoj, precipe pro la fakto de l' subtenoj al la senlaboruloj, altiĝis de 202 milionoj da markoj ĝis 241 milionoj da mk. La subteno al la senlaboruloj kreskis senĉese, dum la subteno al strikantoj en tiu jaro spertis senteblan malpliiĝon."

Relative, kompare kun la stato de senlaboreco, kiu regis dum la tuta jaro 1930 en Germanio, la rezultoj estas malpli katastrofaj por la sindikatoj ol oni estus povinta kredi unuavide.

Superproduktado k malsato.

En la angla ĵurnalo „La Dimanĉa Kuriero" (Sunday Express) oni povis legi nombrojn, laŭdire oficialajn, pri la superproduktado en la mondo. Nuntempe ekzistas stoko (provizo) da 5½ miliardoj da buŝeloj (= 200 miliardoj da litroj) da greno troa, t.e. dufoje la monda konsumo. – La grandaj burĝaj ĵurnaloj substrekas la fakton, ke ekzistus sufiĉe da faruno k pano por kontentigi la bezonojn de ĉiuj popoloj, eĉ se la terkulturistoj ne kreskigus unu solan grentrunketon dum du jaroj! Por la sukero ekzistas 6 milionoj da milkilogramoj da troaĵo; 13 milionoj da sakoj da kafo estas troaj. La teprovizoj (nur por Britio) montras pliiĝon je 40 milionoj da kilogr. kompare kun la jaro 1926. La kotonrikolto rezultigos 12 milionojn da pakegoj da troaĵo. La grandegaj rezervoj da kaŭĉuko pliiĝis ankoraŭ dum la pasinta jaro je 130 000 milkilogramoj.

Aliflanke multaj milionoj da homoj vivas en mizerego k devas malsati pro manko de pano k faruno k aliaj vivbezonaĵoj. Tiuj faktoj klare konfirmas la Marksajn teoriojn k montras la dilemon k bankroton de l'kapitalisma sistemo. *P. P.*

Laboristaj bataloj en Hispanio.

En Madrid 300 senlaboruloj protestis kontraŭ redukto de sia subvencio, sin prezentante ĉe la ministerio de l' financoj. La ministro respondis, ke tiu demando ne rilatas lin, sed nur la urbestraron. La senlaboruloj en Sankta Sebastiano decidis rifuzi plue pagi la lumonon, k tiuj, kiuj estus elloĝigataj de siaj dommastroj, devus rekte turni sin al la sindikato, kiu ekagos kontraŭ tiuj procedoj. Ili postulis, ke estu pagata al ili dum la daŭro de ilia senlaboreco 65% de ilia meza salajro k ke estu konsentata libera veturado sur la fervojo al tiuj senlaboruloj, kiuj volas serĉi laboron en aliaj lokoj. Ili decidis tute malakcepti la peradon de l'estraroj.

En Labjana mil laboristoj forlasis la laborejojn por protesti kontraŭ procesio de katolikoj k por postuli la redungon de submastro. Aliparte 600 ministoj en Asturio komencis strikon. Ili postulas, ke estu konsentataj al ili 20 liberaj minutoj por manĝi, dum la labortago.

En Zaragoso la laboristoj atingis la liberigon el karcero de ses laboristoj, kiuj apartenis al la strikkomitato. Ĉi tio kaŭzis grandan kontentigon inter la laboristaro, kiu atendis la liberigitojn ĉe la mallibereja pordo k manifestaciis kun ili tra la urbo. *T. S.*

---

anoj veturigis kanonojn k parto vicmarŝis al la tendaro, kiu troviĝas en arbaroj je 12-kilometra distanco de la stacio. Ĉi tiu tendaro estis inaŭgurita pasintan jaron k ĝi estas konstruita per la fortoj de ruĝarmeanoj mem k certe dum unu somero estis ne finkonstruita. Kaj oni devis ankaŭ nunjare daŭrigi konstrui la tendaron k fini ĝin en sekvonta jaro. Veninte al la tendaro, ni unue tagmanĝis, poste aranĝis la tendojn.

En ĉiu tendo da ni troviĝis 10 personoj, ĉiuj ruĝarmeanoj-servantoj ĉe la sama kanono en baterio. Ni aranĝis matracojn el pajlo, ĉiu por si. Mi samnokte trafis al deĵorado en la ĉevalejo, de kiu mi revenis nur matene. Tiel komenciĝis mia ruĝarmea vivo.

Nia tendara tago estis dividita jene dum simplaj tagoj: Je la 5-a horo matene: Leviĝo; 5a h. – 5a h.30 m. – mempriservado; 5a h.30 m. – 6a h. – matena gimnastiko; 6a h. – 6a h.40 m. – varma matenmanĝo k tetrinkado; 6a h.45 m. – 7a h. – envicigo k eliro por militstudado; 7a h. – 14a h. – militstudado; 14a h. – 14a h.30 m. – mempriservado; 14a h.30 m. – 15a h.10 m. – tagmanĝo; 15a h.10 m. – 17a h.30 m. – ripozo; 17a h.30 m. – 18a h.30 m. – ordigado k puriĝado de l'armilaro; 18a h. 30 m. – 18 h.45 m. – mempriservado; 18a h.45 m. – 19a h.45 m. – vespera tetrinkado; 19a h.30 m. – 21a h.30 m. – eksterlerna laboro (diversaj rondetoj, sportado ktp.); 21a h.40 m. – signalo; 21a h.45 m. – vespera vickontrolo; 22a h. vespere – enlitiĝo por dormo.

Dum liberaj (festaj) tagoj estas jenaj ŝanĝoj: Leviĝo je la 6a h.30m. matene; mempriservado – 6a h.30 m. – 7 h.; varma matenmanĝo k tetrinkado – 7a h. – 7a h.30 m.; tagmanĝo – 13a h. – 13a h.40 m. Ĉio alia restas sama, kiel dum aliaj tagoj. Certe dum tiuj tagoj oni estas liberaj, povas fari ĉion laŭ sia deziro, iri ekster tendaro, ricevinte por tio permeson; tamen iufoje oni devigis fari tiun aŭ alian mastruman laboron.

Matene ankaŭ okazas gimnastiko (korpa kulturo) en speciala sporta urbeto, kie estas tre multaj baroj, kiujn oni devas supervenki, t.e. saltado de sur montoj de diversa alto; transsaltado trans kavoj kun k sen akvo de diversa larĝo; transrampado trans bariloj, trarampado sur tero sub pikdrataj bariloj, transirado sur traboj firmaj k balanciĝantaj, troviĝantaj super tero k akvo, kurado, malpeza gimnastiko ktp. (Tamen necesas rimarkigi, ke ofte dum la gimnastiko la komandantoj ne turnis sian atenton al ĝiaj higienaj reguloj, ni faris ĉiujn ekzercojn vestitaj, kuradis k saltadis tuj post la manĝo, kun plenaj stomakoj, ĉar la komandantoj ne estis specialistoj-gimnastikistoj.) Ĉio tio devas kutimigi la ruĝarmeanon al lerto, kutimo al ĉiaj travivaĵoj. Mi antaŭe preskaŭ tute ne okupiĝinte per sporto montris min mallerta multfoje, unufoje eĉ falis de sur trabo en akvon.

Dum unu horo nepre okazas matene post la gimnastiko politika leciono, dum kiu oni instruas politikan abocon, nuntempan politikan situacion. Krom la politika gvidanto (ruse „politruk"), ĝin instruas ankaŭ ĉiuj aliaj komandantoj, kiuj devas ĉiuj bonege estri politik-sciencon. En la Ruĝa Armeo rajtas servi nur laboristoj, kamparanoj, oficistoj; ĉiuj, kiuj ne havas voĉdonrajton, ne servas en la armeo k armilojn oni al ili ne donas, ili plenumas diversajn laborojn k pagas militimposton. (Daŭrigota.)

V. V. Kalaŝnikov, Niĵni-Novgorod.

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en „S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

Havigu al vi ĉiuj
la belegan fantazian romanon
de A. Bogdanov

RUĜA STELO

kolektive el rusa lingvo tradukita sub redakto de N. Nekrasov k S. Rublov. Formato 12×18 cm. 168 paĝoj. Prezo: **1,60 mk. g.**
Tre leginda libro.

Mendu ĝin ĉe Administracio de SAT Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio

MI VOLAS SCII...

Al la K-doj 348, 14942 k 16869.

Vi riproĉas al la socialdemokrata partio, ke ĝi kunhelpas daŭrigi la kapitalisman sistemon („S-ulo“ n-o 356). Iel vi pravas en via argumentado, jes. Soc.dem.funkciuloj, akirinte postenojn kiel administrantoj de urboj aŭ ministroj de ŝtatoj, ofte embarasiĝas pro la neeblo akordigi la socialisman idealon kun la kapitalisma socio ankoraŭ ekzistanta. Tuŝi tiun aferon signifas disvolvi la problemon pri la vojo al la socialismo. La soc. dem. partioj celas atingi ĝin per demokrataj rimedoj, dum la komunista teorio rekomendas la tujan starigon de proleta diktaturo, t.e. rapida forigo de l'kapitalismo. Kiu metodo estas la ĝusta, ni ne povas diri; tion decidos la mondhistorio. Eble la nomitaj K-doj simpatias kun la radikala devizo; mi ne rajtas kritiki ilin. Mi nur scias, ke kelklande, kie la proletaro forlasante la demokration provis entombigi la kapitalismon, ĝi vere entombigis sian propran bonfarton k ĉian politikan liberon. Ni rigardu al Hungario, Italio ktp., kie la proleta klaso suferegas sub la jugo de l'faŝismo, kiun triumfigis la reakcio. Tie la laboristaro por jardekoj estas ekonomie subpremata, spirite katenata, politike senpova k la plej revoluciaj frazoj ne helpas al ĝi. Aliflanke en demokrataj landoj la proletaro sukcesis iom plibonigi sian situacion pere de socialaj leĝoj aŭ de la sindikata movado ktp. Tiu demokratio ja ne estas perfekta, sed multe da homoj preferas la *jamajn* malgrandajn plibonigojn anstataŭ la radikala batalo sen espero je venko. K-do 348 tre eraras, opiniante, ke la socialdemokrata agado plaĉas al la kapitalistoj. Oni streĉe klopodis, forigi la influon de la soc.dem.partio, k precipe en Aŭstrio ĉiel subtenadis la faŝismon, kiu tamen, pro energia kontraŭstaro de laboristaj amasoj, tute malsukcesis. Kelkaj kapitalistoj konfesis, ke la „kaŝiranta“ bolŝevismo (t.e. la socialdemokratio) estas la plej danĝera. Ili deziras, ke la proletaro estu pli ribelema, tiam oni povus pli akre apliki la reakcion.

Koncerne la sintenon de Vienaj tramistoj mi respondas al K-do Theobald, ke tiuj ne pro revoluciemo postulis pli altan salajron, sed simple pro persona egoismo. La klarigprovo de K-do 348 estus komprenebla, se ne temus pri samklasanoj k sampartianoj. Sed la plejmulto el la tramistoj en Vieno same estas socialdemokratoj kiel la plejmulto el aliaj laboristoj. Almenaŭ mi dubas, ĉu la tramist(in)oj en Moskvo agus tiel nesolidare kontraŭ siaj Gek-doj aliprofesiaj. La tramista postulo ja ne rezultigis malutilon al la kapitalismo, sed pli multekostan veturprezon por la fabriklaboristoj, kiuj ĉefe konsistigas la klientaron de la tramo. Ke la Vienaj tramistoj per malsolidaro povus „detrui la kapitalisman sistemon“, estas naiva opinio.

K-do 16869 „ĝustigas“, ke la soc. dem. partio en la aŭstria parlamento voĉdonis ne kontraŭ, sed *por* la garantileĝo okaze de l'bankrotiĝo de la bankego de Rotŝild (Kredit-instituto). Fakto estas, ke kiam la banko havis la unuajn malfacilaĵojn, la registaro enparlamentigis garantileĝon, kiun la soc.dem. deputitoj *malaprobis*, ĉar la registaro ne konsentis pri ŝtata kontrolo de la banko. (Tiutempe mi verkis mian artikolon „Ĉu ankoraŭ kapitalismo?“). *Poste* la situacio de la banko plimalboniĝis k necesis leĝigi novan, pli ampleksan garantion. Por trankviligi la eksterlandajn financistojn, la aŭstria registaro petis la subtenon de la soc. dem.partio; oni eĉ proponis al ĝi ministropostenojn. La soc.dem.partio *rifuzis* eniri la registaron, sed *akceptis* la novan, duan garantileĝon, kiu enhavas kontrolrajton por la ŝtato. (K-do 16869 vidu, mi *ne* estas malsincera. Kompreneble mi ĉerpis mian scion el la gazetoj, la parlamentajn kunsidojn ĉeestis nek mi, nek li.) Kio estus okazinta, se la soc. dem. partio ne estus aprobinta la leĝon k la parlamenta plimulto ne estus akceptinta ĝin, ĉar la faŝistoj voĉdonis kontraŭe? Ĉu la kapitalismo estus pereinta? Nekonsiderante, ke la burĝaro eble estus trovinta ajnan savon por la banko, oni povas supozi, ke en kazo de ruiniĝo granda parto de la aŭstria industrio estus disfalinta, miloj da laboristoj estus senlaboriĝintaj ktp. La kreskeganta mizero estus kaŭzinta ĥaoson, pro kiu la soc.dem.partio ne volis havi respondecon. Por detrui la kapitalismon, la soc.dem.partio (en malgranda lando kiel Aŭstrio) estas tro malforta. La aŭstriaj gelaboristoj ankaŭ ne emas senpripense atakadi ne taksante la venkoŝancojn. Tial la soc.dem.partio nur povas iom eluzi la respektivajn ekonomiajn cirkonstancojn por la interesoj de l'proletaro. En aliaj demokrataj landoj la situacio verŝajne estas la sama. Mi ne neas, ke tiu stato aspektigas la soc.dem.agadon porkapitalisma. La kapitalismo estas malsana k la soc. dem.partioj eble esperas, povi transformi la ĝisnunan privatan kapitalismon en *ŝtatan* similan al la sovetia. Oni konsideras la ŝtatkapitalismon kiel „ŝtupon“ al socialismo. Ankaŭ en Sovetio, kie sola regas la proletaro, oni eĉ nun nur *konstruas* la socialismon. Eble en ekstersovetiaj landoj oni per aliaj metodoj atingos la saman celon sen la oferegoj, kiujn kaŭzis la civitana milito en Rusio. La socialdemokratio volas ŝpari la revolucion. Ĝi volas direkti la *evoluon* al la socialismo. Ĉu ĝi sukcesos? La estonto instruos nin.

Jen ankaŭ respondo por K-do Minke (14942). Mi aldonas, ke per ĉi tiuj linioj mi ne intencis defendi la soc. dem.doktrinon. Por tio mi ne havas kaŭzon. La praktikigo de la soc.dem. programo certe montras mankojn, kiujn mi ne emas vuali. Mi estas socialisto, kiu kapablas pensi libere.

F. S.

POR NIA DISTRO

Ĉi tie oni parolas...

En iu hotelo de itala urbo oni povas legi:

„Ĉi tie oni parolas angle, france, germane, ruse k hispane.“ Tiam venas anglo, kiu petas pri la interpretisto; sed neniu tie troviĝas. –

„Per la diablo! – li kriis – kiu do parolas angle ĉi tie?“

„Nu, sinjoro, – diris la mastro – ĉiuj gastoj el Anglujo.“ *H. B.*

KONTRAŬ LA DOGMOJN.

Pastroj imitas Sovetion.

La klerikulara kontraŭsovetia agitado radikas ja ĉefe en la fakto, ke en tiu regnego la kapitalismo efektive nun ĉesas ekzisti. Trompe oni elpaŝas por „defendi la religion“, sed vere la *kolektivismo* pli maltrankviligas la papon ol la propagando de dekmiloj da ateistoj. La eklezioj tute ne estus entreprenintaj sian atakon kontraŭ Sovetio nur pro tio, ĉar tie multe da homoj fariĝas „sendiuloj“, – pliege ili timas pro la fermo de privataj vendejoj k pro la disvastigo de kolektiva mastrumado. La divers-religiaj episkopoj bone konscias, ke kun la lasta juda butiko malaperas ankaŭ ilia influo sur la amasojn, ĉar la privatposedo dense interplektiĝas kun diokredemo. Ili precize scias, ke la kolektivigo forigos la restojn de privatmastruma pensmaniero, sur kiu baziĝas ĉia religieco. Ili *ĝuste* komprenas, ke en kolektivigita socio eklezioj ne havos lokon, ĉar homoj vivantaj en orda socisistemo ne ŝatos petpreĝi al dio pri favoro nebezonota. Mankos la kondiĉoj por religiema sinteno de la popolo. *Tial* la hipokrita protesto kontraŭ „detruo de la familio“, „religiaj persekutoj“, „forbruligo de ikonoj“ ktp.

Tiom pli mirinda estis por mi jena travivaĵo dum mia pasintjara libertempo. Migrante kun K-do tra la etmontaro de Stirio (provinco de Aŭstrio) mi unuafoje vidis laborantan sur grenkampo *traktoron*. Tio estis tute nekutima bildo, ĉar la aŭstriaj kamparanoj ne tiel kulturas la grundon, sed uzas

plugilojn per ĉevaloj aŭ bovoj tiratajn. Interesite ni rigardis, kiel la maŝino bruetante fosas la sulkojn k kiam ĝi alvenis por turniĝi, ni ekinterparolis kun la traktorgvidanto. Li diris, ke la traktoro ŝparas homojn k bestojn, ĉar ĝi plugas samtempe per *tri* plugtranĉiloj. Ni demandis lin, al kiu do apartenas tiu kampo k je nia surprizego li respondis, ke la proksima monaĥejo estas la posedanto. Do ni klare ekkonis, ke pastroj mem aplikas la plej modernajn teknikajn rimedojn por ekspluati la teron por siaj celoj, sed ili furioziĝas, se la reganta proletaro same agas por utilo de la tuta popolo. Tiu imitado al sovetiaj mastrummetodoj esper-eble senmaskigos la pastraĉaron en la okuloj de ĉiuj prudentuloj k pens-kapabluloj.

Poste ni eĉ kuraĝis viziti la monaĥejon; estas kvazaŭa grandbieno kun preĝejo k antikva biblioteko. Ĉi lasta devenas el la 17-a jarcento k enhavas strangaĵon, nome 2 tamburformajn sonplifortigilojn, konsistantajn el konkavaj metalplatoj, ĉe ambaŭ larĝflankoj de la salono. Se oni mallaŭte parolas al unu plato, tio estas aŭdebla ĉe la alia plato trans distanco de 28 metroj. Eĉ tiktako de poŝhorloĝo transaŭdiĝas. Kompreneble ni uzis tiun okazon por diri kelkajn propagand-vortojn esp-lingve — verŝajne la unua hereza parolo tiuloke. Ankaŭ la preĝejon ni eniris, kies pompo akre konstrastas kun la mizero de la ĉirkaŭloĝantaj kampuloj. La preĝejo estas moderne instalita, eĉ per elektraj lampoj, sur kiuj mi hazarde rimarkis la fabrikmarkan signon „Votan“. (Votan estis ĉefdio de la germanaj idolanoj.) Do la katolika eklezio eĉ je eksteraĵoj entenas kontraŭdirojn. Oni nur bezonas malfermi la okulojn! *F. S.*

PENSU MEM!

J. Burger (601).

Mel. germ. „Stimmt an mit hellem, hohem Klang“.

Ho, kial nur por vi, prolet'
viv-zorgoj k sufero,
k kial via infanet'
jam vivas en infero?

Nur tial, ĉar nepensemul'
dumvive vi ja restas
k supre en ĉiel-nebul'
sopiroj viaj estas.

Ho, kial tiu luksa stat'
por eta ar' en mondo,
sed por plejmulto nur malsat'
en sama homa rondo?

Nur tial: vi ne pensas mem,
— preferas vi la kredon;
pro „dia“ savo el dilem'
toleras vi ĉi cedon

Ne; — vi trompita kamarad',
neniam el mizero
ni venos per parol-helpad'
al rajto k libero.

Sin mem nur savas proletar'
per propra forta volo;
por nia liberiga far'
jam — „P E N S U
M E M“, — popolo!

Por relative tre modera sumo
vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA
VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

536 paĝoj. Form. 14×20 cm. Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk. (afrankite).

SAT 23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstraße 1, Leipzig O 27.

TRA ESPERANTIO

La XI-a Kongreso de SAT en la nederlanda gazetaro.

Nuntempe ĉie en la mondo okazas internaciaj kongresoj. Se ili estas sufiĉe gravaj aŭ se la personoj ludantaj rolon en tiaj kongresoj estas famkonataj, tiam la ĵurnalistaro penadas akiri raportojn pri la kongreso k pri ĉio, kio rilatas al ĝi.

La esperanto-kongresoj tamen ankoraŭ ne tiom valoras por la raportistaro. Kaj kvankam nia organizo ekzistas en la intereso de la laborista movado, ni esp-istoj tamen ne facile sukcesas ĉe la gazetaro.

En la plej lastaj jaroj tamen multo ŝanĝiĝis en Nederlando. Jam multaj gravaj gazetoj nun enpresigas informojn, komunikojn k priesp-ajn artikolojn. Speciala esp.-gazetservo, starigita de la 6 nederlandaj esp. organizoj (al kiu ankaŭ la L.E.A. partoprenas) prizorgas la dissendadon k kolektadon de tiaj artikoletoj ktp. Same per helpo de ĝenerala presoficejo. Tial aperis en 1930 en la diversaj malgrandaj k grandaj gazetoj sume 2060 artikoloj, informoj, raportoj ktp. Memkompreneble ni ankaŭ tiel propagandis por nia kongreso.

Al la XI-a la ĵurnaloj ankaŭ ne sendis specialan raportiston. Nur faris tion la plej granda laborista soc.dem. ĵurnalo „Het Volk“ (La Popolo), tamen nevolonte. Karakterize do estas, ke tiu ĵurnalisto, ĉeestanta la kvaran laborkunsidon, tiel interesiĝis pri esp-o, ke li zorgis pri pli da raportoj rilate okazintaĵojn ĉe la kongreso k pri esp-o. Li mem konstatis la uzadon de esp-o k entuziasmiĝis. Estas por ni esperdona, ĉar tiu raportinto estas redaktoro de suprenomita ĵurnalo. Li trapenetros por esp-o la redakcion.

Sume ni ricevis ĝis 11-a de aŭgusto 17 raportojn el 9 ĉiutagaj ĵurnaloj k 2 semajnaj gazetoj, inter kiuj burĝaj k unu katolika. Tiuj lastaj tre koncize enpresigis raportojn de la ĝenerala presoficejo. Ĉefe ili mencias la unuajn kunsidojn k la foriron de la opoziciuloj.

Unu ĵurnalo salutis k raportis esp-lingve kun tradukoj holandlingvaj. Tiu organo estis „De Tribune“ (La Tribuno), komunista. Tio povus esti laŭdinda, se ne ĝuste tiuj artikoloj fuŝus nian movadon, kaŭzantaj miskomprenon k naŭzon. La artikoloj estis prizorgataj de unu el la opoziciuloj en lingvaĉo, preskaŭ nelegebla, ni diru, — esp-o. Pli bone ne estu uzata esp-o ol en tia senzorge aplikata, plenplena da eraroj, lingvaĵo. Memkompreneble ĉio en tiu gazeto estis unutendenca, kontraŭ-SAT-a k por-opozicia. Neniam la redakcio de tiu, de nur tre malmultaj legata, gazeto okupis sin pri esp-o, same ne interesas sin pri esp-o la kompartio en Holando. Certe nur la fakto, ke la ulo, kiu prizorgaĉas la esp. rubrikon, povas trovi la plej malbelajn insultvortojn kontraŭ la SAT-Direkcio k la nekomunistoj, estas la kaŭzo, ke li povas uzi la kolonojn de la komunista gazeto „De Tribune“. Ja li diras, ke la gvidantaro de SAT fariĝis soc. demokrata, etburĝa! Kaj ĝiaj membroj estas gesinjoroj, socialfaŝistoj, anarko-faŝistoj. Tio estas la rimedo por malfermi al si la kolonojn de kom. gazetoj. Sed tiel li ne servas al esp-o, nek al sia partio. *H. W. A.*

Ĉiujn aĉetojn faru ĉe la Administracio de SAT!

Pro la friponagoj de CK de SEU nia Asocio trapasas en tiu ĉi tempo tre gravan financan krizon, kiu sentiĝas speciale akre en la someraj monatoj, en kiuj la enspezoj estas nur malgrandegaj. Tial donu specialan atenton al tiu ĉi nia alvoko!

Pli ol ĝis nun niaj K-doj devas kutimiĝi al tio fari siajn aĉetojn tute ĝenerale ĉe la Administracio de SAT *(Kolmstrato 1, Leipzig O 27)*[1]. Ĉi tiun adreson ili devas noti kiel plej gravan por siaj bezonoj kiel esperantistoj en sian notlibron, en sian memoron. Ĉi tiun ejon ili devas same konsideri, kiel sian kooperativan butikon en sia loĝloko. Ili ĉe la Adm. de SAT trovos ĉion necesan, bezonatan rilate al la

[1] Je la nomo de *R. Lerĥner* ĝi posedas poŝtĉekajn ĝirokontojn en multaj landoj.

esperanta nutraĵo, tiel kiel ili trovas kontentigon pri siaj materiaj bezonoj en la vendejoj de sia konsumkooperativo. Ne gravas, ĉu la mendantaj K-doj loĝas proksime aŭ malproksime de tiu centro por esperanta literaturo.

Ĝis nun ofte okazis, ke la K-doj turnis sin ekskluzive por mendi SAT-eldonaĵojn, al la Administracio de SAT. Se ili volis aĉeti lernolibrojn, vortarojn, eldonaĵojn el aliaj eldonejoj ktp.. ili skribis rekte al la eldonejoj de tiuj aĵoj mem, ne pensante, ke la SAT-administracio povus prizorgi al ili tiujn objektojn same rapide k bone.

Tio ne plu devas okazi estonte. Ĉiujn esp. bezonaĵojn, ankaŭ la materialon por *kursoj*, lernilojn ktp., oni havigu al si pere de la Administracio de SAT! Por montri tion per konkreta ekzemplo: Mi estas grupestro en iu grupo en Germanio, kiu pro konataj motivoj ne apartenas al GLEA, k ĉe kies membroj ankaŭ por aliĝo al SAT ne ekzistas inklino. Mia grupo do havas memadministradon. Planitaj estas diversaj kursoj por la vintra sezono, kiuj komenciĝos en la fino de septembro. La diversaj kursgvidantoj mendas ĉe mi la lernmaterialon. Unuj emas k kapablas instrui laŭ „Petro". Bone; mi scias, kie ĝin aĉeti, ĉar ĝi estas eldonaĵo de SAT. Aliaj preferas instrui laŭ nacilingva gramatika libro. Kiel do mi havigu al mi tiun libron? Ĉu mi devas serĉi la adreson de l'eldoninto k skribi al Berlin, Hanover aŭ alia urbo? Ne, mi ricevos ĝin same rapide, mendante ĝin ĉe la Adm. de SAT. Kiel ĉiam, la Administracio zorge k akurate plenumos miajn mendojn. Do, la procedo de l'mendado por mi estas pli simpligita. Ĉar unu sola centro liveros al mi ne nur la SAT-librojn, sed ankaŭ ĉiuspecajn lernilojn, vortarojn, propagandliteraturon ktp. Faru do al ĝi ĉiujn viajn mendojn!

Esperanto k instruistaro.

En „La Popolinstruisto" (Der Volkslehrer) troviĝas artikolo pri infaninterŝanĝo (de N.). En tiu artikolo la autoro esprimas la bezonon pri internacia enkonduko de esp-o en la popollernejoj. Li rakontas pri interŝanĝo de germanaj infanoj kun anglaj. Dekunu germanaj infanoj devenis el la popollernejo. Ili ne povis ĝui tute la ekskurson, ĉar en ilia lernejo oni ne instruis fremdan lingvon. La anglaj infanoj nur parolis angle. La interkompreniĝo estis tre malfacila. Ankaŭ nostalgio ekestis. Do la verkinto postulas la esp.instruadon.

*

La instruistoj en Aŭstrio el la Sindikata Asocio decidis jenon 1) lekciojn pri esp-o en gepatraj kunvenoj; 2) lekciojn antaŭ geinstruistoj; 3) kursojn por geintruistoj.

*

Laŭ decido depost pentekosto la norvega geinstruistaro aranĝas somerkurson apud Dramen laŭ Ĉe-metodo. Jam pasintjare la du geinstruistaj asocioj aranĝis Ĉe-kurson. La fakgazeto preskaŭ en ĉiu n-o donas sciigojn pri esp-o.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj k „Praktika informilo pri-esperanta". Prilaboris *Jan Zawada*. Eldono de l' aŭtoro. Varsovio 1931. 208 paĝoj. Form. 13 × 19. Prezo: 3 sv.fk. (4 zlotoj en Polio). *Havebla ĉe Adm. de SAT.*

Ĉi tiu adreslibro estas verkita dulingve (pole k esp-e). En ĝia antaŭparolo estas dirite, ke ĝi estas „destinita por senescepte *ĉiuj* esp-istoj de Pollando, sen diferenco de nacio, religio, sociaj aŭ politikaj konvinkoj." Ĝi „servu ankaŭ dece al la *tutmonda* esp.movado dank'al la pli intimaj interrilatoj kun nia lando, per ĝi ebligitaj." Ni vidas do, ke ĝia celo estas esence nacieca. Ni konsentas, ke la aŭtoro faris gravan k penigan laboron, tamen bedaŭras, ke iam aktiva SAT-ano dediĉis siajn fortojn por verko inda esti farata de neŭtraluloj. Interesa demando estus scii, kiom el la en tiu libro troviĝantaj 4000 personoj scipovas k uzas praktike esp-on. *N. B.*

TRA LA MOVADO

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La 23-an Universalan Esp.-Kongreson en Krakovo partoprenis ĉ. 700 personoj (anoncis sin proks. 900). La malferma kunsido okazis en „Katolika Domo", kie parolis i. a. reprezentantoj de la registaroj de Aŭstrio, Germanio, Liĥtenŝtejno, Holando, Hungario, Norvegio, Rumanio k de l'magistrato de Bialistoko. Kelkaj gvidantaj personoj raportis pri la diversaj propag.atingitaĵoj en div. kampoj (radio, gazetaro, kongresoj, lernejoj, fervojo, poŝto ktp.). Okazis poste diskutado pri perfilma esp.propagando, raportoj pri gazetara propagando k ĝia centrigo, pri vojoj k metodoj de esp-apliko por turisma reklamo, raportoj pri Lingva Komitato k Akademio (speciale pri la punkto: prononcado).

La Kongreso akceptis aklame, ke la 2-a de junio (tago de apero esp-o) estu deklarata kiel tago speciale por la propagando de es-p. Je la fino oni reciproke gratuladis sin, dankadis k disdonis kelkajn medalojn al meritintoj. La venonta Univ.Esp-Kongreso okazos en 1932 en Parizo.

MEMORNOTO

Represis el „S-ul-o":
De Maas-Echo, Rotterdam, aŭg., klasbatalo en Usono (350).

Pri SAT-Kongreso raportis:
Münchener Post, München, 12. 8., *Signalen*, Stokholmo, 13. 8., *Bournemouth Times and Dir.*, 14. 8., *Socialdemokraten*, Stokholmo, 6.8., 16. 8. (kun bildo).

Priesper. artik. k notojn enhavis:
I.T.F.-Bulteno, Amsterdam, aŭg.

Peresper. materialon enpresis:
Le Populaire, Paris, 17. 8., 19. 8. (artikolo de K-do Nathans pri radio k laboristaro kun kelkfoja mencio de esp-o).

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

DANIO
K-do Tycho Emil Castberg, Kaemnerkontor, *Kolding*, interŝ. dan. PM kontraŭ sovetaj, anglaj, bavaraj k skandinavaj.

GERMANIO
K-do dez. koresp. amkaŭ kun ekstereŭropaj Gek-doj. Resp. garantiata. Adr.: Martin Zindler, Kottbuser Str. 6/I., *Görlitz*.

K-do Hermann Fiebiger, *Voigtsdorf i. Rsgb.*, kĉl, L, PI, PK. Resp. garantiata.

ĈEĤOSLOVAKIO
K-do Paŭlo Bartulec, *Louk n. Olzou*, 42, Teŝ Silezio, kĉl, L, PK, PI, pref. kun sovetiaj Gek-doj. Resp. al ĉiuj.

NEDERLANDO
Por nia baldaŭ okazonta ekspozicio ni volonte ricevus korespondaĵojn el ĉiuj landoj. Sendu al: *G. A. Zegers*, Cumminghastraat 34, *Leeuwarden*.

Gek-doj tutmondaj atentu!

Ned. Fed. Lab. Esp., Sekcio Harlemo, aranĝos ekspozicion de 25. ĝis 27. sept. Ni petas ĉiujn Gek-dojn sendi al ni taŭgan materialon por tiu celo, L, PK, PI ktp, ĉiuj estos rekompencataj per respondo. — La prezidanto H. v. Beek, Meidoorplein, 12, *Harlemo* (Nederlando).

Internacio de Socialista Kunbatalo (ISK)
aperigis la novan numeron de sia esperantlingva revuo
ISK
Enhavo:
Hana Fortmiler: La unueca fronto de laboristoj k kamparanoj. *Maria Hodan:* La papo kontraŭ la virinoj. *W. I. Lenin:* Pri la „seksa problemo" k aliaj pripensindaj notetoj.
Po ekzemplero kostas nur 0,25 mk. germ. aŭ 1 internacian respondkuponon
„ISK"-Expedition, Nikolausbergerweg 67, Göttingen (Germanio)

ENHAVO

	paĝo
Georgo Bernardo Ŝa (Shaw) pri Rusio	381—382
Artefaritaj floroj	382—383
La fonto de senlaboreco	383—384
Eksterordinaraj tagoj el mia vivo	384—385
La klasbatalo tra la mondo	385
Mi volas scii	386
Por nia distro	386
Kontraŭ la dogmojn	386—387
Tra Esperantio	387—388
Recenzejo	388
Korespondado	388

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)